

# TEA-BULTENO

4<sup>a</sup> JARO

MAJO 2001

NUMERO 5




## AGENDO



## TRIESTE 2001

- 1 M Sidejo fermita
- 2 M
- 3 Ĵ
- 4 V Prikongresaj laboroj
- 5 S
- 6 D
- 7 L
- 8 M Ordigo de TEA-arkivo
- 9 M
- 10 Ĵ
- 11 V **BERNAJ ALPOJ**
- 12 S
- 13 D
- 14 L
- 15 M Ordigo de TEA-arkivo
- 16 M
- 17 Ĵ
- 18 V Prikongresaj laboroj
- 19 S
- 20 D
- 21 L
- 22 M Ordigo de TEA-arkivo
- 23 M
- 24 Ĵ
- 25 V Prikongresaj laboroj
- 26 S
- 27 D
- 28 L
- 29 M Ordigo de TEA-arkivo
- 30 M
- 31 Ĵ




Fulmrapide pasas tagoj, semajnoj kaj monatoj, ĉefe por tiuj kiuj estas okupataj pri organiz-laboroj por nia nacia evento. Tial ni rekomendas al tiuj, kiuj intencas ĉeesti la **70<sup>an</sup> Italan Kongreson**, haste aliĝi, rezervi tranoktejon, mendi ekskursojn ktp, ĉar kutime lastminuta servo ne ĉiam sukcesas kontentigi malfruajn aliĝantojn.

Kelkaj ŝanĝoj estos farataj en la programo, tial se vi havas retan kunligon, de tempo al tempo rigardu ĝin ĉe <http://www.esperanto.it/fei/congresso/index.html> - ni klopodos ke ĝi estu daŭre ĝisdata!

Aliĝis jam pluraj eksterlandanoj: el Aŭstrio, Belgio, Britio, Francio, Hispanio, Kroatio, Slovenio ktp, eĉ el Brazilo, Japanio kaj Usono, do, feliĉe nia kongreso estos **NE NUR NACIA, SED ANKAŬ INTERNACIA!** Nu, ne facilos krokodili - ni havos la bonŝancon paroli, diskuti, kvereli, amuziĝi, kunkanti Esperante!

Se ĉio ĉi allogas vin, ne tro atendu: tuj kontaktu nin!  
*rete* [testudo@adriacom.it](mailto:testudo@adriacom.it) - [nored@tiscalinet.it](mailto:nored@tiscalinet.it)  
*telefone* 040763244 - 040763128  
*poŝte* TEA - C.P. 601 - IT-34100 Trieste



Okaze de la 56<sup>a</sup> Kongreso, organizita, de la 15<sup>a</sup> ĝis la 17<sup>a</sup> de aprilo, de SAT-AMIKARO en Chambéry, Francio, estis faritaj specialaj stampo kaj glumarko. En ambaŭ aperas elefanta kapo. Ĝi elvokas la faman kaj karakterizan fontanon de la Elefantoj, konstruitan en 1838: ĝi estas kurioza monumento starigita memore de la Grafo de Boigne, grava urbo-bonfarinto.



La poŝtoŝtampo Strážnice, distrikto Hodonin, uzadis/os de la 2<sup>a</sup> de aprilo ĝis la 19<sup>a</sup> de majo 2001 afrankmaŝinstamp-

